

Vilhelmo Schweizer <sup>1</sup>

## Ŝekspiro kaj fruaj svisaj roluloj (16-a ĝis 19-a jarcento)

### Resumo

*Ĉi tiu kontribuo traktas la originojn de la publika atento pri la verko de la angla dramisto Vilhelmo Ŝekspiro (1564-1616) kaj la rolon, kiun ludis Svislando ekde la fino de la 16a jarcento en la malkovrado de tiuj originoj. Nome ankoraŭ antaŭ la grava priŝekspira agado far la eminentaj germanaj verkistoj Wieland, Eschenburg, Lavater kaj Lessing, kelkaj konataj svisaj intelektuloj, precipe el Bazelo, Berno kaj Zuriko, ekinteresiĝis pri la verko de Ŝekspiro, kiun ili parte mem vidis en Anglio. Pere de la mejloŝtona kontribuado de Johann Jakob Bodmer, Albrecht von Haller, Wolfgang Dietrich Sulzer, Johann Heinrich Füssli kaj Ulrich Bräker en la 18-a jarcento la verko de Ŝekspiro povis esti tradukita en la germanan lingvon kaj la tero fekundigata por postaj literaturteoriaj kaj filologiaj debatoj. Certe temas pri fora afero kaj forgesata temo, tamen sendube interesa kaj eĉ iom amuza. La aleman-svisa epizodo de la germanlingvia okupiĝo pri Ŝekspiro povas do fieri pri aparte instiga kaj sugesta signifo, kaj krom tio ĝi havas ankaŭ anekdotecan kaj pentroartan valoron. Cetere Ŝekspiro estas unu el la elstaraj mondaj aŭtoroj, kiuj trovis ĉiam denovan atenton de la svisa teatropubliko ĝis nun.*

Kvankam la esenca literatura debato pri la ŝekspira verko disvolviĝis ĉe la grandaj najbaraj lingvo- kaj kulturmedioj, do unuavice germana, franca kaj itala, ĉi tiu pli vasta ekstera nacilingva grundo aŭ fono ebligis kelkajn specifajn kaj tre interesajn svis(land)ajn kontribuojn, kiel celas montri ĉi tiu studo, kiuj povis grave influi la evoluon de la ĝenerala debato pri Ŝekspiro kaj eĉ fariĝi parto de la literaturhistorio. Temas unuavice pri la fama literatura disputo inter Gottsched<sup>2</sup> kaj la svisoj, en kiu la nomo de Ŝekspiro ludis rolon, aŭ pri la unua grava traduko de la verko de Ŝekspiro, kiu aperis en Zuriko, aŭ pri la unua originala kritiko de la ŝekspiraj dramoj fare de Ulrich Bräker, aŭ pri la ĉi-rilataj ilustraĵoj de Johann Heinrich Füssli. La pritrakto de tiuj temoj konsistigas la ĉefan parton de ĉi tiu kontribuo. Por franclingva Svislando, kiu en ĉi tiu

---

<sup>1</sup> Ne temas pri Vilhelmo Tell. Malantaŭ tiu pseŭdonomo kaŝiĝas konata svisa esperantisto, kiu deziras resti nekonata. Ĉi tiu artikolo estis ekskluzive kaj originale verkita kaj destinita por iu festlibro, en kiu ĝi pro miskompreno flanke de la eldonistoj aŭ alia kialo ne aperis.

<sup>2</sup> Johann Christoph Gottsched (1700-66), el Orienta Prusujo, poste en Lepsiko; germana verkisto, dramaturgo kaj literaturteoriisto.

eseo ne estas konsiderita, estas menciindaj la recenzoj de la neŭŝatela kritikisto Henri-David de Chaillet (1751-1823),<sup>3</sup> pri kies konsiderado ni rezignas.

Detala inventarado de la fruaj svisaj referencoj al Ŝekspiro dum longa tempo mankis. Laŭ la opinio de Ŝekspiro-fakuloj, sen ampleksa registro ne eblas entrepreni profundan analizadon kaj interpretadon de la ideo-historia signifo de la ŝekspira fenomeno rilate ĝiajn percepton, influadon kaj interrilatadon, por pli bone kompreni kiel la fadenoj estis ŝpinitaj en la teksaĵo de la nacilingvaj literaturoj. Dank' al la pionira svisa bibliografio de Bircher/Straumann, kiu aperis en 1971 en Berno/Munkeno,<sup>4</sup> kaj kiu estas ekspluatita por ĉi tiu studo, oni disponas pri sufiĉe multe da fontoj, faktoj kaj konsiderindaj informoj, kiuj estas uzeblaj por klarigi la mirindajn fenomenojn.

## Prologo: svisoj en Londono

Kiel sciante, la pruda moralismo de la realekzistanta protestantismo kondukis en la 17-a jarcento al la konkreta malpermeso de la teatro: 1616 en Lucerno, 1617 en Ĝenevo kaj 1624 en Zuriko. Ke malgraŭ tiu kontraŭteatra etoso en la tiama svisa kulturpolitiko Zuriko tamen povis ludi la impulsan rolon por la konscia percepto de la plej elstara angla dramverkisto en la germanlingvaj landoj, estas kaj restas paradokso de la ideo-historio. Fakte nur post la Franca Revolucio la svisoj denove povis spekti libere teatron – prefere kun la atento al emociaj, pedagogiaj-politikaj kaj poetaj aspektoj – do tiuj, kiuj en la hodiaŭa diskuto sekvas nur post la teatraj kaj dramaturgiaj.

Sed antaŭ ol okupiĝi pri la ĉefaj protagonistoj de la svisa ŝekspira dramo, ni komencu la rakonton de la svisa ŝekspira historio per kelkaj prologaj epizodoj pri unuopaj vojaĝantoj, kiuj havis kontakton kun Ŝekspiro en Anglio.

La unua (kaj evidente sola) kontinenta eŭropano, kiu estis tuŝita de la ŝekspira verko ankoraŭ dum la vivotempo de la majstro, estis verŝajne la bazelano Thomas Platter la Juna (1574-1628). Post la fino de siaj studoj ĉi tiu studento pri medicino vizitis Anglion kaj ĉeestis, la 21-an de septembro 1599, en la nova Globe-teatro de Londono, la prezenton de *Julio Cezaro*. Platter referencis al tiu vizito en sia

---

<sup>3</sup> Pri Ŝekspiro en la franclingva parto vd. la raporton de Jacques Adout: Shakespeare en Suisse romande. Traductions et Spectacles. En: Stadler 1964, p. 153-156.

<sup>4</sup> La bibliografio de Bircher/Straumann 1971 enhavas ankaŭ utilajn biografiajn indikojn pri la koncernaj aktivuloj, kiuj estas utiligitaj en ĉi tiu kontribuo. Laŭ Balz Engler, emerita profesoro pri angla literaturo en Bazelo, kiu estis konsultita dum la verkado de ĉi tiu kontribuo, la bibliografio de Bircher/Straumann restas unika. Certe, pliaj svisaj indikoj estis poste registritaj en la raportoj publikigitaj de la Ŝekspir-Jarlibro (vd. antaŭ ĉio kontribuojn de Christian Jauslin kaj Markus Marti pri svisaj Ŝekspir-enscenigoj) kaj kadre de la Monda Ŝekspir-Bibliografio, atingebla en interreto sub la adreso <http://www.worldshakesbib.org>. Oni konsultu ankaŭ la bazelan projekton pri Ŝekspiro en Eŭropo sub la adreso <http://pages.unibas.ch/shine/metasite.html>, kie troveblas artikolo de Sylvia Zysset pri Ŝekspiro en dialekto (angla versio aperis en la volumo *Shifting the Scene, Shakespeare in European Culture*, eldonita de Univ of Delaware Pr en 2004 de Balz Engler kaj Ladina Bezzola Lambert). Krome ekzistas la referencaro pri *Hamleto* sub <http://www.hyperhamlet.unibas.ch> kaj la retujo <http://www.shakespeare.ch>.

(nepublikigita) vojaĝtaglibro, sed forgesis mencii la nomon de la verkisto, kiu evidente mem troviĝis inter la aktoroj. La vojaĝo de Platter koincidis kun signifa fazo de la historio de Anglio, kiu estis dominata de la reĝino Elizabeto I, kiu sub la impreso de la renesanco multe favoris la arton, literaturon kaj sciencan. De la ‚ora epoko‘ de la angla literaturo ankaŭ Ŝekspiro kaj liaj kunlaborantoj do povis enorme profiti.

Iom poste, en 1614, ankaŭ la zurikano Johann Rudolf Hess (1590-1655) vizitis Londonon, kie jam regis Jakobo I. Hess kunportis hejmen la kvarteldonaĵojn de la spektakloj, kiujn li mem vidis en surlokaj teatroj, inter alie tiujn de *Romeo kaj Julieta* de 1609 kaj *Hamleto* de 1611. Sed kiel Platter ankaŭ Hess ne postlasis personajn klarigojn pri tio, kion li mem vidis kaj kolektis, kaj do maltrafis kontribui al la faka traktado de la verko de Ŝekspiro en sia patrujo. Feliĉe, ĉi tiuj raraj kvarteldonaĵoj<sup>5</sup> konserviĝas en la centra biblioteko de Zuriko kaj apartenas al la plej valoraj originalaj dokumentoj, kiuj pri Ŝekspiro arkiviĝas en Svislando.

## Por la reĝo kaj la libereco

Historia ekskurso: En 1603 Elizabeto forpasis, kaj ŝia posteulo estis Jakobo VI de Skotlando, filo de Maria Stuart, kiu surtroniĝis kiel reĝo Jakobo I de Anglio kaj de la nove konkerita Irlando. Jakobo finis la militon kontraŭ Hispanio, sed ĉe la popolo tiu reĝo estis malŝatata, same en la parlamento, kiu konsideris liajn reformojn malsukcesaj. Post la morto de Jakobo en 1625 lia filo Karlo I fariĝis la reĝo. Kun Francio kaj Hispanio li pace interkonsentis, sed en 1642 eksplodis la interna milito, tiel ke Karlo estis devigata forlasi Londonon por esti ekzekutita la 30an de januaro 1649. Oliver Cromwell (Kromvelo) transprenis la povon, likvidis la absolutismon kaj fondis la anglan respublikon (Commonwealth). Kromvelo mortis en 1658, sed lia filo evidentiĝis ne regipova. En 1660 Karlo II fariĝis la nova reĝo kaj restaŭris la monarkion. Li mortis en 1685 kaj estis sekvata de lia frato Jakobo II kiel posteulo sur la trono. Sed okazis puĉo kontraŭ li, kaj en 1688 estis kronitaj Vilhelmo kaj Maria II, du protestantoj. La paro promesis respekti la akton de la parlamentismo nomatan ‚Bill of Rights‘. En 1701 akceptiĝis la deklaro de ‚Act of Settlement‘, kiu difinis, ke nur protestantoj povos heredi la tronon. Do, ne nur Svislando, sed ankaŭ Britio konis siajn proprajn perturbojn en la epoko de la interreligiaj konfliktoj.

Por kontribui al la solvo de tiuj konfliktoj inter Britio kaj Nederlando la evangeliistoj de Svislando (kiu tiam ankoraŭ ne estis federita ŝtato) sendis tien en 1653 kiel ambasadoron Johann Jakob Stokar (1615-1681), kiu estis eminenta reprezentanto de la urbo Schaffhausen.<sup>6</sup> En sia rolo kiel diplomato Stokar ja detale raportis pri la tiamaj politikaj eventoj en Anglio, sed mankas mencioj pri eventualaj ŝekspiraj teatraj agadoj, kiuj pro la politikaj perturboj ŝajne malofte aŭ tute ne okazis. Dank’ al iuj aliaj vojaĝantoj, kiuj en tiu epoko trafis la kulturen programon en Londono,

<sup>5</sup> Pri kvarteldonaĵoj (Quartos) vd. [http://en.wikipedia.org/wiki/Folios\\_and\\_Quartos\\_\(Shakespeare\)](http://en.wikipedia.org/wiki/Folios_and_Quartos_(Shakespeare)).

<sup>6</sup> Legindan biografion pri Stokar (Stockar) eblas trovi en interreto.

kelkaj magraj informoj pri Ŝekspiro tamen atingis la kontinenton. Tiel ekzemple dum sia vizito al Anglio en 1694/95 Beat Ludwig von Muralt (1665-1749), patricio el Berno, ja aŭdis pri Ŝekspiro, kiun li menciis en siaj *Leteroj pri la Angloj kaj la Francoj*, tamen evidente sen mem bone koni la verkojn de tiu aŭtoro, kies nomon li fuŝliterumis kiel „Schakspear“.

## Svisaj instigoj

Post tiuj ‚praaj‘ indikoj pri Ŝekspiro kaj svisoj en Anglio ni turnu nun nian atenton al tiuj helvetianoj, kiuj postlasis pli videblajn spurojn kaj pli substanciajn informojn pri Ŝekspiro, dank’ al kiuj sekve povis estis signife kontribuate al la diskonigo de la nomo kaj verko de tiu famiĝonta angla verkisto: Temas unuavice pri la kontribuoj de Johann Jakob Bodmer, Albrecht von Haller, Wolfgang Dietrich Sulzer kaj Johann Heinrich Füssli.

Johann Jakob Bodmer (1698-1783) el Zuriko, teologo, profesoro pri svisa historio, verkisto, tradukisto kaj eldonisto, estas konsiderata kiel la unua gravulo en Germanlingvio, kiu pruveble legis la verkon de Ŝekspiro en ties originalo en la jaro 1723 aŭ 1724 per eldono de Nicholas Rowe, komprenante la signifon de la angla dramverkisto. Ĉi tiun libron li prunteprenis de sia amiko Laurenz Zellweger (1692-1746), kuracisto en Trogen (Appenzell) kaj brila konanto de la literaturo, kiu havigis al si mem anglajn librojn tra iu nevo el Leiden, kie li studis. Bodmer mem eksciis pri Ŝekspiro tra (la franca eldono de) la ĵurnalo *Spectator*, kiun li legis en 1718<sup>7</sup>. Mem li posedis edinburgan eldonon de la ŝekspiraj verkoj de la jaro 1753. Kvankam Bodmer ne postlasis koheran aŭ fermitan komenton pri Ŝekspiro kaj mem ne faris tradukon el lia verko, li tamen estas konsiderata kiel la unua ŝlosila persono rilate la malkovron de la „Angellanda Sofoklo“. Bodmer ja multokaze opiniesprimiĝis pri la ŝekspira genio, kaj estis ankaŭ li, kiu multe klopodis por la realigo de la zurika eldono de la unuaj grandaj Ŝekspir-tradukoj far Wieland<sup>8</sup> kaj Eschenburg (vd. sube), sur kiuj baziĝis la germana debato pri Ŝekspiro ĝis la fino de la jarcento. Do, Bodmer servis unuavice kiel inspiranto-instiganto, kiu faris utilan peran, organizan kaj publikrilatan laboron, kreante la ligojn inter la ĉefaj Ŝekspir-protagonistoj. Ĉar Bodmer uzis la version „Saspar“ por Ŝekspiro, la aŭtentikeco de la veraj konoj de Bodmer ĉiam denove estis pridubataj. Malgraŭ tio, la ekzistantaj dokumentoj atestas kaj ebligas fari la konkludon, ke Bodmer kaj ties cirklo ludis la esencan rolon por la enkondukado de la ŝekspira verko en la germanlingvaj regionoj.

Parenteze estas interese menci, ke ĉirkaŭ 1741/42 estis presita la unua traduko de Ŝekspir-verkaĵo, nome *Julio Cezaro*, fare de von Borck<sup>9</sup> en pare rimaj aleksandraj

---

<sup>7</sup> Tion skribis Paul Vetter en sia studo pri Ŝekspiro kaj la germanlingva Svislando en 1912.

<sup>8</sup> Christoph Martin Wieland (1733-1813) estis apud Lessing, Lichtenberg kaj Kant la plej signifa verkisto de la racionalismo kaj la plej maljuna de la kvaropo ĉirkaŭ Herder, Goethe kaj Schiller.

<sup>9</sup> Caspar (aŭ Casper) Wilhelm von Borck(e) (1704-47), germana (prusa) diplomato kaj tradukisto. Vd. <http://www.ostdeutsche-biographie.de/borcca04.htm>

versoj. Tuj poste sekvis la atako de Gottsched kontraŭ Ŝekspiro kaj kontraŭ tiu traduko kaj eksplodis la literatura disputo inter Lepsiko kaj Zuriko. Samtempe aperis la eseo de Schlegel<sup>10</sup> kun la unua kritiko de certaj aspektoj de la ŝekspira arto. Alian gravan rolon en la perado de Ŝekspiro ludis la *Literaturaj Leteroj* de Lessing<sup>11</sup> de la jaro 1759, precipe la deksepa kaj kvindek-unua.

Krom Bodmer estas menciinda Albrecht von Haller (1708-1777), alia berna patricio multe pli fama ol von Muralt, medicinisto, profesoro en Göttingen kaj Berno, verkinto de la fama poemo ‚La Alpoj‘ kaj korespondanto de Voltero. Kvankam en sia vojaĝtaglibro de 1727 (li estis en Londono) ankoraŭ mankis indiko pri Ŝekspiro, en 1746 li finfine atentigis pri la verkisto kiel la „granda konanto de la homa koro“ kaj pri liaj „fortaj bildoj“ kaj „sangaj emocioj“ kaj publikigis recenzojn en la klerulara bulteno de Göttingen. Ĉe *Hamleto*, kiu estis taksata de von Haller kiel „iom tro miriga kaj preskaŭ senintenca tragedio“, lin ĝenis la dubinda gusto de la epoko, rimarkebla en la krudaj „plebecaj“ scenoj. Per siaj rimarkoj von Haller enkondukis kulturhistorian elementon en la ĝeneralan diskuton. Krom tiuj konsideroj, la ŝekspira influo restis limigita al la menso de von Haller, kvankam li estis konsiderata kiel universala klerulo.

Ja vere grava evento estis la intertempa alveno de Wieland en Zuriko, kie li restadis inter 1752 kaj 1759<sup>12</sup>. Kun li la diskuto pri Ŝekspiro rimarkinde vigliĝis kaj la genieco de la angla verkisto ricevis novan emfazon. Ŝekspiron oni komparis kun Mikelanĝelo kaj Koreĝo de la literaturo, sed kun von Haller oni abomenis liajn vortludojn kaj fiplebajn ŝercojn. Al ĉi tiu kunteksto apartenas anonima recenzo de la londona surscenigo de *Henriko VI* en zurika morala semajna gazeto, en kiu estis traktitaj la problemoj de la iluzio kaj de la tempo-akcelado en la dramo. Supozeble temis pri la unua detala kritiko de tiu spektaklo en la germana lingvo.

Ankoraŭ dum sia restado en Svislando, en junio 1759, Wieland ricevis sugeston de Wolfgang Dietrich Sulzer (1732-94)<sup>13</sup>, urba sekretario en Winterthur, pri la neceso germanigi la ŝekspiran verkaron. Korespondante kun Wieland, Sulzer interŝanĝis ŝekspirajn verkaĵojn. Tiam okazis, ke en Bazelo la kritiko ne tre favore recenzis anoniman tradukon de *Romeo kaj Julieta* en blankaj versoj. Sed ĝuste tiu eble ne sukcesinta provo devas esti alte taksata por la plua evoluo de la tradukado kaj aplikado de la blankaj versoj en la germana poezio. Jaron antaŭe en Winterthur estis prezentita la dramo de Wieland *Johanna Gray*, kiu estas konsiderata kiel la unua germana blankversa tragedio; ĝi ne estus pensebla sen la influo de Bodmer, kiu apogis la blankajn versojn. Tamen necesis atendi ankoraŭ dudekon da jaroj ĝis la epokfara majstroverko de germana blankversdramo pere de *Nathan La Ŝagulo* de Lessing povis aperi kaj kvardek

---

<sup>10</sup> August Wilhelm Schlegel (1767-1845), germana verkisto, estetikisto, apud Wieland kaj Eschenburg supozeble la plej eminenta germanlingva Ŝekspir-tradukisto. En la enkonduko al la Esperanta *Hamleto* (Marmande 1964) estas notite, ke L.L. Zamenhof eventuale utiligis la germanan tradukon de Schlegel kiel pontlingvan verkon por sia propra traduko. Sed tio restas hipotezo, ĉar Gaston Waringhien sugestis, ke la rusa aŭ pola traduko ludis modelan rolon.

<sup>11</sup> Gotthold Ephraim Lessing (1729-81) estis la plej grava verkisto de la germana racionalismo.

<sup>12</sup> Kiel gasto de Bodmer. Poste li reiris al Biberach.

<sup>13</sup> Oni ne konfuzu lin kun Johann Georg Sulzer (1720-79), la prilaboranto de *Cimbelino*.

jarojn, ĝis kiam la unuaj blankversaj tradukoj de Schlegel produktiĝis. La aŭtoro de la unua germanlingva traduko (1758) de *Romeo kaj Julieta* kaj de la dua ŝekspiraĵo entute restis dumvive inkognita<sup>14</sup> – temis pri Simon Grynaeus (kies vera nomo estis Griner, 1725-1799). Ĉi tiu bazela protestanta teologo kaj pastoro, reformisto kaj humanisto pasigis tri jarojn en Anglio, kie li vidis David Garrick en la rolo de Romeo.

La kvara grava kontribuo de tiu periodo estis la frukto de la entuziasmo, per kiu la pentristo, verkisto kaj arteoriisto Johann Heinrich Füssli (1741-1825)<sup>15</sup> okupiĝis pri Ŝekspiro. Ĉi tiu juna zurikano estis disĉiplo de Bodmer kaj konato de Breitinger<sup>16</sup>, eĉ amiko de Lavater<sup>17</sup>, kun kiu li studis teologion. En la aĝo de dek kvin jaroj Füssli kreis desegnaĵon pri la apero de la Spirito en *Hamleto* kaj faris tradukon de *Makbeto*, kiu bedaŭrinde perdiĝis. En 1764 li vojaĝis al Anglio. En Londono li establis sian konstantan loĝlokon, eknomis sin Henry Fuseli kaj atingis certagradan famon. En siaj bildoj Füssli montras frapan preferon por supernaturaj temoj: La feinaj scenoj en *Songó de somermeza nokto*, la sorĉistinoj en *Makbeto* kaj la fantomo en *Hamleto* estas motivoj, kiujn li ripete aplikis.<sup>18</sup>

Konklude eblas diri, ke ankoraŭ antaŭ la epokfara interveno de Lessing elde Svislando preskaŭ ĉiuj esencaj elementoj estis liveritaj por nutri la fekundan diskutadon ĉirkaŭ Ŝekspiro en la venontaj jardekoj, eĉ se la publika atento tiam ankoraŭ ne estis tre vasta. La elementoj de ĉi tiu diskuto koncernas ĉefe la demandojn de la lingva esprimkapablo kaj de la rolo de la emocioj inkluzive de la problemoj de fantazio kaj iluzio, de la formado de la supernaturo kaj de la uzado de la blankaj versoj. Krome temas pri problemoj de la karakteroj kaj de la karakterizado, pri prihistoriaj, pedagogiaj, psikologiaj kaj politikaj (ŝtatacivitanaj) konsideroj kaj pri la demando de kontraŭregulaĵoj (anomalioj) ĉe Ŝekspiro.

## La debato translokiĝas

Post la apero de la *Literaturaj Leteroj* de Lessing (1759) kaj la publikigo de la ŝekspiraj tradukoj de Wieland (1762-66), Eschenburg (1775-82) kaj Schlegel (1797-1810), la debato pri Ŝekspiro en Germanio mem fariĝis pli vigla, pli riĉa, pli profunda kaj pli pasia. Sed tio tute ne signifis, ke la svisoj ĉesis okupiĝi pri Ŝekspiro, eĉ male, ĝis proksimume la jarcentoŝanĝo la spektro de la svisa kontribuado konservis sian specifan karakteron en diversaj rilatoj.

---

<sup>14</sup> Nur en 1933 eblis certigi lian aŭtorecon.

<sup>15</sup> Kiam Füssli estis en Romo, li estis menciita en letero de Lavater al Herder (1773) kaj en letero de Herder al Johann Georg Hamann (1774).

<sup>16</sup> Johann Jakob Breitinger (1701-76), teologo kaj filologo en Zuriko. Kutime oni mencias lin samtempe kun Bodmer, kies kunlaboranto li estis.

<sup>17</sup> Johann Caspar Lavater (1741-1801) estis reformista pastoro, filozofo kaj verkisto en Zuriko. Liaj instruistoj estis Bodmer kaj Breitinger.

<sup>18</sup> Detalan studon pri la pentraĵoj de Füssli vd. Eudo C. Mason: Johann Heinrich Füssli und Shakespeare. En: Stadler 1964, p. 83-103.

La proza traduko de ĉiuj dramaj verkoj de Ŝekspiro far Eschenburg<sup>19</sup> aperis en Zuriko. Tra Georg Joachim Zollikofer<sup>20</sup> en Lepsiko Eschenburg konatiĝis kun la eldonejo Orell, Gessner, Füssli kaj Kompanio.<sup>21</sup> Eschenburg prilaboris la pecojn, kiujn tradukis Wieland, kontrolante la originalon kaj aldonante la mankantajn dek du dramojn. Dua eldono aperis en 1798, kaj nerajtigita represo en 22 volumoj estis eldonitaj de 1778 ĝis 1783 en Mannheim, Germanio. Mannheim estas notinda, ĉar tie ĉi oficis kiel teatrodirektoro la sviso Abel Seyler (1730-1801), filo de predikanto en Liestal (Basel-Land) kaj mem komercisto en Nordgermanio; dank' al li estis kaŭzitaj rimarkindaj sukcesoj kun liaj Ŝekspir-enscenigoj. Nova, 23-voluma, parte ilustrita angla eldono aperis inter 1799 kaj 1802 ĉe Hans Jakob Thurneysen (1754-1803) en Bazelo, kiel represo de la eldono de Samuel Johnson kaj George Steevens de 1793 en prizorgo de I. Reed.

Sojle de nova literatura epoko, la romantikismo, unu el la plej fruaj sciencaj interpretoj de *Hamleto* entreprenis en 1818 la tiĉindevena diakono Johann Conrad von Orelli (1770-1826), kiu agadis en la Predika Preĝejo de Zuriko. Lia kuzo, Johann Caspar von Orelli (1787-1849), same teologo, kreis, kun Eschenburg, la bazon por la filologia pritrakto de la ŝekspira verko<sup>22</sup>. Kiel oni vidas, ĉi tiuj rilatoj estis tre subtilaj kaj efektiviĝis en konkreta rondo de limigita nombro de specifaj intelektuloj svisaj kaj germanaj, kiuj parte konis unu la aliajn, ĉu persone, ĉu per korespondado. Svisoj vojaĝis al Germanio, germanoj veturis al Svislando.

Al la priŝekspira percepto subite aldoniĝis nova kaj fakte iom kurioza fenomeno.

## Voĉo de la popolo

Simptomaj por la kulmina entuziasmo (aŭ manio) de Ŝekspir-admirantoj de tiu tempo estis la personaj impresoj, kiujn postlasis Ulrich Bräker (1735-1798) el Toggenburg<sup>23</sup>. Malkovrita de la instruisto Johann Ludwig Ambühl (1750-1800) kaj

---

<sup>19</sup> Johann Joachim Eschenburg (1743-1830) naskiĝis en Hamburgo, estis profesoro ĉe Carolinum en Brunsviko, kie li laboris ĝismorte. Klasika filologo, verkisto, tradukisto, amiko de Lessing.

<sup>20</sup> Peran rolon inter la eldonejo kaj Eschenburg do ludis Georg Joachim Zollikofer (1730-88) el St. Gallen, ekde 1758 pastoro en Lepsiko, kaj rilatanto kun multaj samtempaj verkistoj. Li atentigis la eldonejon pri Eschenburg, kiu ricevis la taskon revizii kaj kompletigi la Ŝekspir-tradukon de Wieland.

<sup>21</sup> Ĉi tiu eldonejo, presejo kaj librovendejo kun la nomo Orell Füssli, origine fondita en 1519, refondita en 1890 (akcia societo) kaj en 1999, ekzistas kiel holdinga kompanio ĝis hodiaŭ kaj estas la plej granda entrepreno de tiu speco en Svislando. Ĝia sidejo troviĝas en Zürich-Wiedikon.

<sup>22</sup> Johann Caspar von Orelli laboris kiel pastro en (Italio) kaj poste kiel instruisto de la kantona gimnazio en Chur (Grizono). Li fakis pri retoriko kaj hermeneŭtiko, estis lerneja reformisto, ĉefbibliotekisto kaj posta kunfondinto de la zurika universitato. Kiel konanto de la itala literaturo li malkovris la plej maljunan italan fonton de *Romeo kaj Julieta*.

<sup>23</sup> En *Allgemeine deutsche Biographie* (Leipzig 1876) li aperas kiel Brägger. Tie oni ekscias, ke pro trompo li trafis al la prusa armeo, en kiu en 1756 li devis partopreni la Sepjaran Militon. Sed samjare post la batalo de Lobositz (Lowositz) en Bohemio li sukcesis fuĝi de la soldata metio. Hejme li kariiris kiel malgranda fadenvendisto kaj fabrikisto, sed pluvivadis en modestaj kondiĉoj. Ke li okupiĝis pri Ŝekspiro ne estas menciita en tiu germana biogramo.

publikigita ĉe Johann Heinrich Füssli, lia *Vivohistorio*, en kiu Bräker iom rakontis pri si mem, sekvigis, ke ĉi tiu filo de kamparano el orienta Svislando feliĉe ne estis forgesita<sup>24</sup>. Malsata je scioj, Bräker aliĝis al la Reformita Morala Societo en Wattwil<sup>25</sup>, en kiu membris precipe kleruloj kaj eminentuloj. Dum liaj bienaj najbaroj mokis pri li, Bräker, konsiderante sin mondcivitano, senlace prunteprenadis<sup>26</sup> librojn el la biblioteko de la Societo. Ĝiaj anoj eĉ donis al Bräker la honoron prezenti la inaŭguran paroladon de la jarkunveno de 1790.

La ŝekspirajn verkaĵojn<sup>27</sup> Bräker, evidente profunde fascinita de ili, abunde komentis en unika notaro titolita per *Iom pri la spektakloj de Vilhelmo Ŝekspiro*, kiujn li kompilis en 1780. La komentario, kiu estas komponita kiel speco de dialogo inter Bräker kaj Ŝekspiro, reprezentis larĝan skalon inter spontana natura originaleco (Rousseau!), naiva subjektiveco kaj mirinda intuicia kompetenteco pri esencaj aspektoj de la ŝekspira arto. Sur sepdeko da paĝoj Bräker kvazaŭ „analizis“ ĉiun unuopan spektaklon de la dramisto, kiu estis nomita de li „karulo de la ĉielo“, envicigota inter „miaj sanktuloj“. Lia troigita patoso pri la genieco de la „dieca verkisto“, kiu lasas malantaŭ si ĉiujn ceterajn verkistojn, atingas kulminon jen ĉe la laŭdegado de *Timono de Ateno*, jen ĉe *Reĝo Johano*, jen ĉe *Koriolano* kiel ĉefa frukto de la verkkapablo kaj intuicio. La pinta verko de Ŝekspiro por Bräker tamen restis sen dubo kaj hezito *Hamleto*, „ci, reĝo inter ĉiuj ludoj; ci, kerno de ĉiuj verkoj, kiun iu ajn verkisto povis iam ajn fari laŭ tiu maniero; ci, juvelo (aŭ diamanto) en la krono, kiu faras pli da honoro al la verkisto ol al tiu, kiu ĝin portas; ci, modelo (aŭ prototipo)<sup>28</sup> de ĉiuj librosalonoj, koro en la koroj – mi ne scius per kiuj vortoj min esprimi, kiom ci estas mia karulo“... „mi ne ripozos... ĝis vi ornamos mian libroŝrankon.“... Interese estas, ke *Romeo kaj Julieta* ne tre plaĉis al Bräker, ankaŭ *Sonĝo de somermeza nokto* fiaskis en lia juĝo, verŝajne ĉar li simple ne komprenis ĝin. La pecon *Rikardo la Tria* li kondamnis kiel „plej brutalan kaj malamegatan“. Li esperis, ke la teatraĵo publike ne estos prezentita, ĉar necesas protekti „la bontrajtan homon kontraŭ la monstro“.

Sed Bräker ne nur pentris nigre-blanke. Liaj pritaksoj fariĝis multe pli subtilaj, kiam li skribis, ke ekzemple *La Du Ĝentilhomoj de Verono* „estas bone farita peco, sed ne eblas ĝin kalkuli inter la plej bonaj, sed inter la mezaj“. Ĉe *La Venecia Komercisto* Bräker aprobis la kunigon de du diversaj historioj, nome tiun de „la krueleco de la judo kaj la amnegocaĵo de Bassanio“ en unusola agosceno. La konversacion de Lanceloto kun ties patro, la blinda Gobbo, li trovis vivaŭtentika, kvazaŭ li mem vidis junajn kaj maljunajn Gobbojn. Ĉe *La Gajaj Edzinoj de Vindsoro*, kiu laŭ lia opinio devus prefere porti la nomon de la dikaĉa Falstafo, lia menso rememoris iun taniston el Wattwil.

---

<sup>24</sup> Eltiraĵoj de lia *Vivohistorio* estis unue publikigitaj en *Schweizerisches Museum*, en 1789 ĝi aperis kompleta, kaj en 1792 povis aperi ankaŭ lia *Taglibro*.

<sup>25</sup> Iam vilaĝo, nun urbeto, ĉefurbo de la valo Toggenburg (kantono Sankt Gallen).

<sup>26</sup> Tian ŝatanton de libroj oni kutime nomas en la germana lingvo ‚librovermon‘ (Bücherwurm). En la literaturo ĉi tiu metaforo estis uzata unuafoje en 1747 de Lessing en sia komedio *La juna klerulo*, do la nocio evidente aperis en la de ni traktita periodo.

<sup>27</sup> Ne estas klare, ĉu Bräker uzadis la volumaron de la traduko de Wieland, aperinta en 1762-66, aŭ ĉu li povis akiri la volumojn de Eschenburg de 1775-82.

<sup>28</sup> Germanlingve: Edelstein, Ausbund.



Aparte legindaj estas la eroj, ĉe kiuj Bräker emociiĝis pri unuopaj figuroj. Ĉe *Makbeto* lia kolero ekflamis. La haroj hirtiĝis, kiam li legis ĝin: „Makbeto, ci, murdfosaĵo, ci, hontmakulo de la homa gento; ci, ĝisosta geedza paro de la diablo kaj lia avino: ci, haladzo de la infero!“ La malmultaj samtempanoj, kiuj havis la okazon legi la ŝekspirajn komentojn de Bräker, devis esti perpleksaj, despli ke ili devenis de lerneje neinstruita simplulo. Oni konsideris ilin kiel ekzemplojn de natura originaleco, de senantaŭjuĝa senpartieco. La literatur-filozofia periodo de Sturmo kaj Impeto kun sia emfazo de la ‚genieco‘ furoris, ĝuste kiam Bräker intervenis.

Ke tia amatora aŭtodidakto kapablis tiom trafe enfokusigi ĉiujn ĉefajn punktojn de la tiama debato ĉirkaŭ Ŝekspiro, estas preskaŭ nekredible, despli ke li ne posedis proprajn librojn, nek vidis Ŝekspir-spektaklon, nek havis rilaton al literaturaj rondoj krom al la modesta vilaĝa biblioteko. Sed li kondukis, protokolis kaj juĝis kvazaŭ li persone ĉeestis la ŝekspirajn spektaklojn sen pseŭdoakademiecaj ambicioj. En siaj prilumadoj jen li provis senti la diversajn karakterojn kaj ties konfliktojn kiel ĉe Antonio en *Antonio kaj Kleopatra*, jen li esprimis rezervon pri efektivigitaj pasioj aŭ rilate la kredindecon de unuopaj agopasadoj kiel tiu ĉirkaŭ Portia en *La Venecia Komercesto*. Jen li emocie dividis la sentojn kun Kordelia kaj Otelo, jen li enkondukis moralecan, eĉ pedagogian elementon dum la pritakso de la timigaj efikoj de Makbeto. Male al la konservativulo von Haller kaj aliaj, Bräker estis unu el malmultaj komentantoj, kiuj sentis fortan plezuron pri la burleskaĵoj de la krudulaj scenoj – supozeble lia kamparana deveno permesis al li pli simple percepti kaj pli facile digesti la naturajn vivajn aferojn<sup>29</sup>. Konsiderante la eksterordinaran originalecon de la kontribuo de Bräker, eblas bedaŭri, ke liaj eldiroj ne estis publikigitaj dum lia vivotempo, tiel ke lia kontribuo restis senefika por la reflektado en la literatura historiografio<sup>30</sup>. Tamen, en la antaŭparolo al sia libro pri Homero la art- kaj literatur-historiisto Hermann Grimm (1828-1901)<sup>31</sup> agnoske referencis al la laboro de Bräker kun la deziro levi la propran konsideradon pri Homero al la sama nivelo, kiel faris Bräker rilate al Ŝekspiro.<sup>32</sup>

## Psikologia, pedagogia kaj politika dimensioj

La psikologia interesiĝo, kiu esprimiĝis en pluraj traktaĵoj de svisaj komentantoj, estas iel nature ligita kun la pedagogiaj kaj historiaj-politikaj konsideroj, por kiuj la

---

<sup>29</sup> Komp. Walter Muschg: *Ulrich Bräker: Etwas über William Shakespeares Schauspiele*. Basel 1942, p. 16 k.s.

<sup>30</sup> Lia verkaĵo *Etwas über William Shakespeares Schauspiele, von einem armen, ungelehrten Weltbürger, der das Glück genoss, denselben zu lesen. Anno 1780* (konservita en la urba biblioteko Vadiana en St. Gallen) estis publikigita nur en 1852 en Lepsiko. Kun la titolo *Lebensgeschichte und Natürliche Abenteuer des Armen Mannes im Tockenburg* la teksto aperis en 1993 ĉe Reclam en Stuttgart. Holger Böning verkis biografion: *Ulrich Bräker, der arme Mann aus dem Toggenburg – Eine Biographie*. Orell Füssli, Zürich 1998. Samtempe aperis ankaŭ aliaj libroj pri Bräker.

<sup>31</sup> Filo de Wilhelm Grimm (1786-1859), fama germana lingvisto kaj literatursciencisto, kolektanto de fabeloj kaj legendoj.

<sup>32</sup> Laŭ Thürer, Georg: *Der Arme Mann aus dem Toggenburg begegnete Shakespeare*. En: Stadler 1964, p. 65-82.

ŝekspira verko donas instigojn kaj kiuj estas karakterizaj por la svisa reago. Por la pedagogia kaj politika ideoj servas motivoj el antikva Romo aŭ la edukprogramo de Anglio. Ekzemple J.G. Sulzer estis konvinkita, ke iu patro, kiu vidis la spektaklon *Romeo kaj Julieta*, ne (plu) povis malmole trakti sian filineton. Ĉi-rilate estas aldoninde, ke Johann Heinrich Pestalozzi (1746-1827) ne postlasis en siaj aŭtoraĵoj vidpunktojn pri tiuj ĉi demandoj en la ŝekspira verko, kio signifas, ke la elstara svisa pedagogo evidente ne okupiĝis pri Ŝekspiro.

La bibliografio de Bircher/Straumann listigas multajn aliajn nomojn de konataj svisoj kaj germanoj, kiuj iel estis ligitaj kun la ŝekspira laboro. Estus troige menciigi ĉiujn, sed ne manku la atentigo almenaŭ pri Salomon Gessner (1730-88), zurika poeto, pentristo kaj eldonisto, pri kiu oni kredas, ke li bone konis la ŝekspiran verkaron, kvankam ne eblas pruvi tion laŭ liaj skribaj atestoj. Famas la vinjetoj, kiujn li kreis por la zurikaj eldonoj de Wieland (1762-66) kaj Eschenburg (1775-82), kiuj montras tipajn scenojn el la ŝekspiraj spektakloj, kaj ilin li faris kun granda humursento. Aliaj signifaj Ŝekspir-ilustristoj estis Johann Heinrich Lips (1758-1817), persona konato de Goethe, kaj Johann Martin Usteri (1763-1827) – ambaŭ zurikanoj.

Inter la malmultaj virinoj, kiuj siatempe okupiĝis pri literaturo, kaj pri Ŝekspiro, troviĝis la bernano Julie von Bondeli (1731-1778), kiu estis konsiderata kiel unu el la plej kleraj kaj originalecaj svisinoj. La anglojn ŝi estimis malpli pro la angla lingvo mem, sed pro iliaj admirindaj intelektaj kvalitoj. Notinda estas ŝia amikeco kun la ĝeneva verkisto, filozofo kaj pedagogo Jean-Jacques Rousseau (1712-1778).

## **Epilogo: Gottfried Keller kaj Conrad Ferdinand Meyer**

Fine indas ankoraŭ alproksimiĝi al du gravaj svisaj verkistoj de la 19-a jarcento, kiuj estis sendube influitaj de Ŝekspiro: Temas pri Gottfried Keller (1819-1890) kaj Conrad Ferdinand Meyer (1825-1898).

Temas pri epoko, en kiu multaj verkistoj klopodis imiti la anglan idealulon. Pro tio Keller uzis, en siaj leteroj al Hettner, la vorton „ŝekspiromanio“. La ĉefan meriton, kiun Keller kredis esti malkovrinta en la ŝekspira verko, ne estis la lingvo kaj la bildoj, la karakteroj kaj la moroj, la religio kaj la politiko – aferoj, kiuj estas provizoraj kaj forpasas kun la tempo. La veraj elstareco kaj unikeco, neripetebaj ĉe mondliteraturaj grandeguloj kiel Ŝekspiro, estas la „unuopaj situacioj majestaj kaj teruraj“, kiujn ili kreis ekster ĉia ideo enhavo kaj stila esprimo, respegulantaj la efektivan „poeziecon“, la poezian tutecon. Kiel ekzemplon Keller menciis la monologon de *Hamleto* pri la kranio de Jorik. Do ĉe Ŝekspiro Keller trovis bazan enrigardon en la karakteron de la plej alt(nivel)a poezia sukceso. Ĉi tiu kogno kaŭzis, ke Keller mem komencis verki pli konscie kaj malpli laŭ hazarda intuicio. Keller taksis la ŝekspirajn figurojn grandiozaj, la

vivon de tiuj homoj li nomis „esenca“<sup>33</sup>. La nocio de la „esenca homo“ revenis en *La Verda Henriko*, la ĉefverko de Keller, aŭtobiografia romano kun klerigaj celoj pri la vivo de fiaskinta pentristo, eldonita en 1854/55. Sendube Ŝekspiro do helpis al Keller, malgraŭ multaj diferencoj en iliaj verkoj, kaj Keller evidente plej multe profitis kiel rakontisto, kvankam lin impresis la drama arto de Ŝekspiro. Tiel Keller povis realigi mem kelkajn ideojn, kiujn li admiris ĉe Ŝekspiro, tamen sen mem fariĝi dua Ŝekspiro.

Ĉar Keller kaj Meyer estis antipoduloj en la homa kaj arta rilatoj, ilia rilato al Ŝekspiro devis esti diversa. Forta influo de la ŝekspira arto estis trovita ankaŭ en la verko de Conrad Ferdinand Meyer. Ĉi tiu legis la anglan majstron jam en siaj junaj jaroj kaj estis sufiĉe bone informita pri lia verko longe antaŭ ol havi mem sukceson kiel verkisto. Dumvive Ŝekspiro estis admirata de tiu sviso. Ekzemple en 1871 Meyer diris, ke sian ferian libertempon pasigitan en Grizono<sup>34</sup> li ne eltenis sen Homero kaj Ŝekspiro. Ambaŭ verkistoj perceptis la mondon kiel scenejon, sur kiu okazas song-similaj ludoj, vidante la homojn kiel nurajn aktorojn. Sed aktorado signifas rolludadon, kiu povas esti aŭtentika aŭ trompa. Pro tio neniu homo povas fidi al alia, kaj ĉies fido povas esti trompata. Daŭre okazas tragedioj, ĉar oni faras erarojn, kaj daŭre okazas komedioj, ĉar oni elektis eraran vojon. La faroj de la homoj aperas, depende de la vidpunkto, jen en la lumo de tragika-heroa grandeco, jen en la lumo de la stulteco aŭ malsaĝeco. Ĉiuokaze la vivo estas dominata de la plenpotenco de la morto. Sekureco ne ekzistas, ankaŭ ne por tiu, kiu kredas sin sekura. Kaj tiel plu. La ekzistado en sia tuteco estas komprenebla kiel somera nokta sonĝo, kiel vintra fabelo aŭ kiel multe da bruoj pro nenio, aŭ laŭ la lingvo de *Makbeto* kiel ludo plena de sonoj kaj furiozo, kiu signifas nenion.

En *Jürg Jenatsch* (1876) frapas paraleloj kun Ŝekspiro. La ĉefa temo de ĉi tiu historia romano de Meyer estas la provo de la hispanoj konkeri Grizonon dum la Tridekjara Milito. Fine la heroo tragike kaj perforte pereas. Malantaŭ tiu tragedio rekoneblas la ombro de Makbeto. Ekzistas aliaj personecoj kaj scenoj kreitaj laŭ la modelo de ŝekspiraj figuroj kaj okazaĵoj. Ke Meyer „ŝekspirumas kiel eble plej forte“, kiel li mem diris la 3-an de oktobro 1883, validas ankaŭ por *Jürg Jenatsch*. Ankaŭ en aliaj verkoj de Meyer troveblas ŝekspiraj imitaĵoj, ekzemple la krudaj plebuloj, la vagabondoj kaj krimuloj, kiuj kontrastas la nobelan patoson de la grandaj eventoj. Meyer konfirmis, ke lia rakonto *La Sanktulo* similas al tiu de *Hamleto*. Ĉu do Meyer estas verkisto modlita laŭ la spirito de Ŝekspiro? Ne tute, sed parte jes, kiel Louis Wiesmann opinias, kvankam por la literatura kritiko la figuroj de Meyer estas malpli aŭtentikaj, pli artefaritaj ol tiuj de Ŝekspiro. Ankaŭ lia lingvo estas malpli atleta, kaj laŭ la formo ekzistas diferencoj: la arkitekturo de liaj verkoj orientiĝas malpli laŭ Ŝekspiro, sed pli laŭ la modelo de Ŝilero. Tial kaj Meyer kaj Keller ne sukcesis fariĝi la Ŝekspiroj de la novelo kaj romano, kiujn ili eble celis esti.<sup>35</sup>

---

<sup>33</sup> Kompare kun la superflua homo Oblomov (1859) ĉe Gonĉarov en la rusa literaturo.

<sup>34</sup> Kantono en sudorienta Svislando, kie estas parolataj la germana, retoromanĉa kaj itala lingvoj.

<sup>35</sup> Laŭ Wiesmann, Louis: Gottfried Keller und Conrad Ferdinand Meyer in ihrem Verhältnis zu Shakespeare. En: Stadler, p. 105-122.

Necesis atendi la alvenon de la granda germanlingva svisa dramaŭtoro Friedrich Dürrenmatt (1921-1990), por ke Ŝekspiro ricevu novan ondon de atento en Svislando kaj en la germanlingva literaturo. Sed tio estus nova longa ĉapitro.

## **Bibliografio**

Bircher, Martin / Straumann, Heinrich (1971): *Shakespeare und die deutsche Schweiz bis zum Beginn des 19. Jahrhunderts. Eine Bibliographie raisonnée*. Bern, München.

Stadler, Edmund (1964, red.): „Shakespeare und die Schweiz“. *Schweizer Theater-Jahrbuch XXX* der *Schweizerischen Gesellschaft für Theaterkultur*. Bern. (Publikaĵo konsistanta el dek unu fakaj kontribuoj, eldonita okaze de la 400-a datreveno de la naskiĝo de Ŝekspiro).

Helmich, Hans-Joachim: Ulrich Bräker (1986). *Lebensgeschichte und natürliche Abenteuer des Armen Mannes im Toggenburg. Text und Materialien. Stationen der Literatur* (Hrsg. Von Heinrich Biermann/Bernd Schurf). Düsseldorf.

Bräker, Ulrich (1945): *Die Freunde – Der Wanderer. Bräker und Lavater. Gespräch im Reiche der Toten. Etwas über William Shakespeares Schauspiele*. Basel.